

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965
Claude Gacond, 141-a radioprelego, 1966.06.15 & 1966.06.18

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pasintan jaron la internaciaj rondoj celebris la dudekjariĝon de Unuiĝinta Naciaro. Dum Ligo de Nacioj kvazaŭ mortis antaŭ ol atingi tiun aĝon, ĝia posteulo UN konstante kreskas kaj nun grupigas preskaŭ ĉiujn ŝtatojn de la mondo.

A.- Bedaŭrinde financa krizo sombrigas la festadon de la dudeka jaro de la Ĉarto de Unuiĝinta Naciaro. Pro tio en la paroladoj kaj artikoloj markintaj tiun eventon oni rimarkas deteniĝemon.

Cl.- Oni evitas raporti pri la negativaj aspektoj de la funkciado de tiu grava organizaĵo pro ĝia malsano. Sed tiu malsano ankaŭ silentigas la laŭdojn. Kiel ĉe lito de vundito oni ne emas paroli pri lia akcidento kaj konservas dubojn pri lia resaniĝo. Sed tiujn dubojn oni ne tro diras.

A.- En la juristaj medioj oni verŝajne plej forte komprenis la gravecon de la malsano de UN. Oni deziras trovi rimedojn por revigligi kaj pli glate funkciigi tiun organizaĵon. De ĝia farto dependas fine la farto mem de la paco.

Cl.- Tial la Asocio por la disvolvo de monda juro kunvokis al Nico (Sudfrancio) reprezentantojn el juristaj organizaĵoj kaj internaciaj movadoj. Dum tritaga kolokvo okazinta la 27-28 kaj 29-ajn de majo 1965 tiuj personecoj provis trovi rimedojn, kiuj estu kapablaj helpi al UN adaptiĝi al la hodiaŭa mondo.

A.- Tiu inteligenta kontribuo al la festado de la dudekjariĝo de UN permesis tre utilajn kontaktojn inter pensoj ofte kontraŭaj. Se dum la unua tago de tiu Nica Kolokvo tiuj diverĝaj opinioj sin klare aŭdiĝis, la sekvaj diskutoj ebligis alveni al konverĝaj kaj ege konstruaj konkludoj. Komunaj proponoj ilin diskonigis.

Cl.- Multaj internaciaj movadoj kaj ambasadorejoj deziris povi akiri la tekstojn de la debatoj en tiu Nica Kolokvo. Sub la titolo *L'Adaptation de l'O.N.U. au monde d'aujourd'hui* [Adaptado de UN al la hodiaŭa mondo] aperis en ducentpaĝa volumo la raportoj prezentitaj en tiu Nica Kolokvo kun la verkitaj diskutoj. Tiu libro estas unu el la plej utilaj studoj ĝis nun aperintaj pri la reformado de la Ĉarto de UN. Ĝi evitas sekvi la facilan vojon de la utopiaj ŝanĝoj kaj akcentas la tujajn plibonigojn, kiuj estas fareblaj sen tuŝi al la teksto mem de la Ĉarto.

A.- Tiu verko ludas de nun rolon de mejloŝtono sur la vojo al la plibonigo de UN. Se la Nica Kolokvo grupigis nur centon da partoprenantoj, nun miloj da homoj povas mediti ĝiajn diskutojn kaj tiel konverĝigi sian penson al tiu de la partoprenintoj al la nica rendezuo.

Cl.- Ne estas la nombro de partoprenantoj, kiu faras la gravecon de internacia kongreso, tio estas la kvalito de la debatoj. Dum oni estos forgesinta plej multajn kongresojn okazintaj pasintjare, oni certe longe citos la kontribuadojn de la Nica Kolokvo.

A.- Dum kelkaj semajnoj ni turnos nian atenton al tiu manifestacio. Ni citos parolojn de multaj juristoj kaj de prezidantoj de organizaĵoj porpacaj. Vi tiel verŝajne malkovros la gravecon de tiu Nica Kolokvo kaj verŝajne bedaŭros, ke inter ĝiaj partoprenintoj ne troviĝas reprezentanto de la esperantistaro.

Cl.- Se en Nico ĉefe kunsidis juristoj, tamen estis loko por nejuristaj personecoj. Inter ili ni citu Abaton Pierre, la fondinto de la Komunumoj Emmaŭs kaj Gary Davis, la fondinto de la Ligo de la Mondcivitanoj. La esperantistoj forestas la kongresojn, kie la internacia vivo

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965
Claude Gacond, 141-a radioprelego, 1966.06.15 & 1966.06.18

formiĝas, pro multaj kaŭzoj. La esperantistoj streĉas ĉiujn siajn fortojn por sin mem organizi. Tion farante ili forgesas sendi ambasadorojn en la neesperantistajn rondojn.

A.- Edmond Privat siatempe ludis la rolon de ambasadoro de nia movado. Lia personeco permesis renkontojn inter plej diversaj mondaj organizaĵoj. Lian nomon ni trovas en la partoprenantaj listoj de la plej gravaj internaciaj kongresoj. Lia morto ne instigis la esperantistaron trovi al li anstataŭanton.

Cl.- Pro nia izolemo la internaciaj rondoj nin nekonas. Tio ne malebligis nin tamen konatiĝi kun iliaj laboroj, almenaŭ per iliaj eldonaĵoj. Tiel ni pretiĝos al la necesa rendevuo.

A.- Ni diris, ke en Nico unue sin esprimis malsimilaj konceptoj pri la sekvendaj vojoj al adaptado de la Ĉarto de UN al la hodiaŭa mondo. Oni rimarkis grupon, kiu deziris kompletan reverkon de tiu Ĉarto. Alia grupo, en kiu troviĝas Henri Laugier, unu el la unuaj adjunktaj ĝeneralaj sekretarioj de UN dum la periodo 1946-1951, batalas por la limigo de la ŝtataj suverenecoj. Tria grupo montris, ke ĉia reformo de la Ĉarto riskas ĝin malfortigi anstataŭ ĝin plibonigi. La nuna monda politika situacio ne estas favora al reformo.

Cl.- Dum la diskutoj montriĝis iom post iom, ke la kaŭzo de la nuna krizo de UN estas multe pli imputebla al la misuzoj de la Ĉarto, ol al la difektoj kaj mankoj de la tekstoj mem. La ĝenerala sekretario de UN, sinjoro Thant esprimis tiun ideon en mesaĝo, kiun lia subulo sinjoro Stavropoulos venis legi en Nico.

A.- Unesko ankaŭ sendis delegiton al la Nica Kolokvo en la persono de sia jura konsilanto sinjoro Saba. UN kaj Unesko atendis de neregistara kongreso, kiel tiu de la Nica Kolokvo, lumigon super aspektoj, kiujn registaraj delegitoj ne rajtas kritike rigardi.

Cl.- Kio estas tre kuraĝiga en la lego de la nicaj debatoj, tio estas la konstato, ke en neregistaraj rondoj personoj altrangaj en la registaraj medioj havas la kuraĝon ne nur kritiki la doktrinon pri ŝtata suvereneco, kio jam estas multo, sed alportas pozitivajn proponojn, kiuj pravas ilian deziron vidi kreski la mondorganizaĵon UN.

A.- Se hodiaŭ ni tuŝis nur ĝeneralaĵojn, la venontajn semajnojn ni ebligis al vi travivi la debatojn en tiu Nica Kolokvo. Atente aŭskultu, kaj skribu al ni vian opinion. Pere de niaj elsendoj tiu kolokvo fariĝu nia kolokvo.

Cl.- Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-